Hermann Löns,

# Erikejaj betuloj

*tradukita de Joachim Gießner*

Erikejaj betuloj en freŝverda hel',
la genist' orbrilas kiel flam',
gaje trilas alaŭdoj sub alta ĉiel',
ĉiu tetro glugluas pro am'.

La rigardo migradas kun miro kaj ĝu'
tra marĉa, blankfloka belec',
sur l'erika flormar' sub lazura blu',
kaj ĝi ŝvebas al ĉiela altec'.

Al la blua ĉiel', kie vagas nubet'
kiel silkmalpeza lanflok'.
El la koro elsonas etera kantet',
kiu flugas al ĉielalta lok'.

Delikata kant', tenera kant',
kiel filigrana arĝent',
kiel nubo migranta jen super la land',
kiel lanfloketo en vent'.

*Traduko de la Germana poemo "Alle Birken grünen" de* Hermann Löns *(∗1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-619-1251 (2012-10-19 23:24:27)*

*Tiu ĉi poemo troveblas en* `http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf`*.*
*Pri Joachim Gießner vidu:* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Joachim_Giessner`*. La melodio - verkita de Ernst Licht - estas aŭdebla en* `http://ingeb.org/Lieder/allebirk.html`*.*

Hermann Löns,

# Alle Birken grünen

Alle Birken grünen in Moor und Heid';
Jeder Brambusch leuchtet wie Gold.
Alle Heidlerchen jubeln vor Fröhlichkeit;
Jeder Birkhahn kollert und tollt.

Meine Augen gehen wohl hin, wohl her
Auf dem schwarzen, weißflockigen Moor,
Auf dem braunen, grünschimmernden Heidemeer,
Und steigen zum Himmel empor.

Zum Blauhimmel hin, wo ein Wölklein zieht,
Wie ein Wollgrasflöckchen, so leicht;
Und mein Herz, es singt ein leises Lied,
Das auf zum Himmel steigt;

Ein leises Lied, ein stilles Lied,
Ein Lied so fein und so lind
Wie ein Wölklein, das über die Bläue zieht,
Wie ein Wollgrasflöckchen im Wind.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Hermann Löns *(∗1866-08-29 – †1914-09-26).*

*Arg-619-1250 (2012-10-19 23:12:16)*

*Pri la poeto vidu la vikipediejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns`*. Vidu ankaŭ:* `http://www.handmann.phantasus.de/gf_alle_birken_gruenen.html`*.*